Rose Ausländer,

# Repaciĝo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ree mateno
sen fantomoj
En la roso briletas la ĉielarko
kiel signo de l' repaciĝo.

Vi rajtas ĝoji
pri la perfekta konstruo de l' rozo
Vi rajtas en la verda labirinto
perdiĝi kaj retroviĝi
en klara formo.

Vi ratas esti homo
fidoplena

La mateno roso rakontas al vi
fabelojn. Vi rajtas
nove ordigi la aĵojn
koloron disdoni
kaj ree
beldiri

En tiu ĉi mateno
vi kreanto kaj kreito

*Traduko de la Germana poemo "Versöhnung" de* Rose Ausländer *(civila nomo: Rosalie Beatrice Scherzer, ∗1901-05-11 – †1988-01-03) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2014-03-18.*

*Arg-980-1978 (2014-03-18 15:54:39)*